

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Aurora Bute

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Thérèse Jamin

Marija Jerkovič

Ilona Koutny

Aranka Laslo

Anna Lowenstein

Lee Miller

Martin Ptasiński

Bardhyl Selimi

László Szilvási

Trezoro Huang Yinbao

Josef Vojáček



ilei

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Mireille GROSJEAN: <i>ILEI-Kongreso okazis en Serbio</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Pri la kongresa temo „Lernado en virtualaj komunumoj”</i>	13
Aurora BUTE: <i>Intima ILEI-Kongreso</i>	14
Trezoro Huang Yinbao: <i>Disvastigu la idealojn kaj valorojn de Unesko [...]</i>	16
Mireille GROSJEAN: <i>ILEI forte aperis en Lahtio dum la UK</i>	19
Anna LOWENSTEIN: <i>Nova retejo por lernantoj</i>	20
Ilona KOUTNY: <i>Universitata kunlaboro en la instruado de Esperanto [...]</i>	22
El la landoj kaj sekcioj (AL, DE, HU, HR, RS, US)	23
<i>Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI</i> (Mireille GROSJEAN)	29
<i>Dek jaroj en Esperanto-lando - parto 8</i> (Luiza CAROL, Mireille GROSJEAN)	31
Josef VOJÁČEK: <i>Kelkaj notoj pri instruado de lingvoj, precipe de Esperanto, en bazlernejoj en Ĉeĥio</i>	35
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	37

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.
- Vicprezidanto:** Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto
- Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lana_espero@mail.ru>.
- Estrarano pri financaj aferoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Vic-prizorganto de financaj aferoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>.
- Estrarano:** JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita
profesoro de LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/ Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo supre: D-ino
GONG Xiaofeng „Arko” el Ĉinio,
unu el la du novaj Honoraj
Membroj de ILEI; **mal-supre:**
vizitado de monaĥinejo dum la
52-a Kongreso

Sur la dorskovrilo: Nacia
vespero en la 52-a Kongreso de
ILEI

Enkonduko

Karaj legantoj,

Jen ni trakuras nian jubilean jaron kun plej diversaj eventoj. Nia revuo utilos al vi por ekscii pri ili kaj sekvi la evoluon de la vivo de la Ligo.



Grava paŝo en tiu ĉi jaro estas la subskribo de kunlabora interkonsento inter ILEI kaj LIBE, la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Post la kreo de ekzamena regularo por blinduloj pri lingvokapablo kaj la starigo de programo por sendi al ili niajn du revuojn en por ili uzebla formato, tio estas valora etapo.

Ni devas pripensi pri maniero redukti nian deficiton; pro tio ni nun esploras pri nova enhavo kaj nova formo por *Juna Amiko*, cele al kreskigo de ĝia abonantaro. Jam ni limigas niajn agadojn por vivi ŝpareme, tamen niaj membroj atendas servojn. Kie estas la meza taŭga vojo? ILEI enkondukis la kategorion C-landoj, kiu ebligas membrigon de diversaj personoj en evolulandoj; tamen tio eblas nur, se troviĝas mono en la Koleghelpa Kaso. Vi mem decidu, kiel vi povas subteni la agadojn de la Ligo: trovi novajn membrojn, trovi novajn abonantojn por *Juna Amiko*, nutri nian kason kaj/aŭ niajn fondusojn. Nia familio devas kreski. Mi deziras al vi informan legadon!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

ILEI-Kongreso okazis en Serbio

de Mireille GROSJEAN, prezidanto

En tre taŭga loko proksimume 50 esperantistoj atingis la urbon Ĉaĉak kaj la fakultaton pri teknikaj sciencoj, kiu dependas de la Universitato de Kragujevac. Tre taŭga estis la loko, ĉar la dormdomo, la manĝejo kaj la universitataj salonoj estis en promenada distanco kaj tre adekvataj. Rekorda nombro de estraranoj alvenis: ses el sep. Nur nia vic-prezidanto Ivan COLLING ne povis veni al Eŭropo. La estraro ne sukcesis kunveni, ĉar la programo estis tre densa.

La Komitato kunsidis kaj decidis, ke du el niaj membroj fariĝu Honoraj Membroj. Temas pri D-ino GONG Xiaofeng „Arko” el Ĉinio kaj nia fidela kunlaboranto redaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* Jozefo NÉMETH el Hungario. En la postaj kunsidoj de la Komitato, kvorumo ne estis atingita, tiel la voĉdonoj venos laŭ reta maniero.

Du lingvokursoj ebligis al komencantoj kaj progresantoj uzi nian lingvon kaj plibonigi sian lingvonivelon. Mihai TRIFOI kaj Aurora BUTE zorgis pri tiuj du grupoj. La komencantoj ricevis atestilon okaze de la solena fermo. Okazis kurso pri la serba lingvo, okazis diversaj prelegoj. Elena NADIKOVA organizis Lingvan Festivalon. Belegan nacian vesperon ni ĝuis dimanĉe vespere, ni povis aŭdi virinan koruson kaj spekti infanan grupon, kiu dancis.

Kompreneble la 70-jariĝo de ILEI devis kunvenigi la kongresanojn en gaja etoso. Tio okazis marde vespere. Mireille GROSJEAN preparis dudekon da ludoj. Ŝi organizis la ludadon en kvarpersonaj grupoj, kie komencantoj sidis kun progresantoj. Dum unu horo la grupoj interparolis arde kaj ade por trovi la respondojn. Kompreneble la uzo de telefonoj kaj komputiloj estis malpermesita. Sekvis la korektado de la laboro kaj premioj por la plej kapabla grupo. Sekvis ankaŭ donacoj al tri personoj, kiuj kiel ILEI naskiĝis en 1949. Pro peto de diversaj kongresanoj, ke tiuj ludoj estu je dispono de ĉiuj, la ludoj aperos iom post iom en IPR kaj fine de la felietona aperigo ni metos la solvojn en la retejon de ILEI www.ilei.info.

Ni ricevis viziton de Dimitrije JANIČIĆ kaj Ljiljana SEKELJ-MILENKOVIĆ, kiuj prezentis al ni la libron „La ponto super Drino” [*vidu la foton dekstre*], de la fama serba aŭtoro Ivo ANDRIĆ (1892-1975), kiu ricevis la Nobelpremion pri literaturo en 1961.

La lastaj du tagoj de la Kongreso estis Konferenco komune organizita kun la Fakultato. Partoprenis studentoj, docentoj kaj profesoroj. Tio estas granda sukceso de nia estrarano pri Kongresoj Radojica PETROVIĆ. Kadre de tiu Konferenco okazis trihora kurso pri EO por tiuj serbaj kolegoj. Pro la fakto,



ke la Konferenco entenis pli ol dek prelegojn, ĝi kalkulblas por la progreso de la karieroj de la serbaj profesoroj, kiuj partoprenis en ĝi.

Per du ekskursoj ni povis malkovri la belegan landon Serbio, kie ni vidis verdegan naturon kaj bele ornamitajn monahinejojn el la Mezepoko. Ni multon eksciis pri la historio de tiu regiono, kiu multe suferis inter tri imperioj: la

otomana-turka, la aŭstro-hungara kaj la slava. Eĉ en la dudeka jarcento okazis pliaj suferoj en la naŭdekaj jaroj. La streĉoj kun la najbaroj foje sentebblas.

Kvar detalaj raportoj pri la Kongreso estis dissenditaj el Ĉaĉak. Kune kun la kongresa rezolucio ili aperas en la ĉefpaĝo de nia retejo. 13 kuraĝaj kongresanoj atingis tre frue sabate la 20-an de julio la serban ĉefurbon Beogrado kaj sidis kune en aviadilo por salti al Helsinki kaj atingis Lahtion je la 13-a horo por ebligi al kelkaj el ili partopreni en la kunsido de la Komitato de UEA jam je la 14-a horo.

Granda danko iru al la Loka Kongresa Komitato kaj al ĉiuj, kiuj iel kontribuis al la sukceso de tiu bela semajno!

Enkonduka prelego por la ILEI-Kongreso Ĉaĉak 2019

Nia LIGO fondiĝis en 1949. Do ĝi estas en 2019 sepdekjara. Ni devas memori pri ĝiaj atingoj kaj gravaj momentoj.

Jam ni povis arigi diversajn tekstojn de iamaj prezidantoj kaj redaktoroj de nia revuo *Internacia Pedagogia Revuo* IPR en la dua numero de tiu ĉi jaro.

Tio plu okazos en la numero tri. Tiel ni akiris sciojn kaj impresojn pri la personeco kaj laboro de niaj antaŭuloj. Tiuj personoj dediĉis sian energion kaj kapablojn al la antaŭeniro de la Ligo, ni estu dankemaj al ili.

Ni nomu la prezidintojn ekde 1972:

- Helmut Sonnabend (1972-1985)
- István Szerdahelyi (1985-1987)
- Edward Symoens (1988-1991)
- Stefan MacGill (1991-1993)
- Duncan Charters (1993-1998)
- Mauro La Torre (1998-2003)
- Radojica Petrović (2003-2009)
- Stefan MacGill (2009-2013)
- Mireille Grosjean (ekde 2013)



Membroj de LKK kun la prezidanto. De maldekstre: Nebojša STANKOVIĆ, Blanka LASLO, Mireille GROSJEAN, Aranka LASLO, Radojica PETROVIĆ (ĉiujn kongresajn fotojn de la nuna numero ni ricevis de Martine DEMOUY)

Kiel tutkomencanto en 1987 en La Chaux-de-Fonds, mi sentis la katastrofan etoson, kiam mia instruisto Claude Gacond anoncis la forpason de **István Szerdahelyi**. Giganta perdo. Mi tute ne konis lin, sed mi kiel iu infano sentis la gravecon de tiu personeco en la momento de lia forpaso. Ni ne povas menciigi profesoron **Szerdahelyi** nur per tri linioj, ĉar lia studentino Doktorino Ilona Koutny nun estras la Interlingvistikajn Studojn en Poznano, Pollando, ĉar lia studentino Doktorino Katalin Kováts nun estras la valoregan retejon *edukado.net*, la ne malhaveblan ilaron por instruistoj, ĉar lia studentino Zsófia Kóródy nun zorgas pri la apero de Esperanto en la germana urbo Herzberg. Ni povas do konstati, ke la influo kaj transdonokapablo de Profesoro **Szerdahelyi** ankoraŭ nun havas gravajn pozitivajn sekvojn.



Radojica Petrović kaj Elena Nadikova dum nia kongresa ekskurso

El la nekrologa teksto de la tiama prezidanto Duncan Charters, mi legas citaĵon pri **Edward Symoens**. „Edward Symoens ĝis la morto estis konata kiel klarvida kaj dediĉita kunlaboranto en la antaŭenigo de la instruado de la internacia lingvo Esperanto. Dum sia servado kiel Prezidanto de ILEI, li rekonis la esencan rolon de la celoj de la Ligo en la progreso de la tutmonda E-movado. Tio motivis lian sukcesan reproksimiĝon de la Ligo al UEA kaj la sekvan pli intiman kunlaboron kun UEA en la reciprokaj celoj de la du

organizaĵoj.” Povas esti, ke mi vidis lin en La Chaux-de-Fonds, mi ne memoras. Tamen mi kaptis iom de lia personeco tra miaj kontaktoj kun lia filino Margaretha.

En tute alia etoso mi eksciis pri la forpaso de **Maŭro La Torre**, subite, en 2010. Mi registris lian voĉon kaj lian akĉenton influitan de lia denaska lingvo, la itala. La aŭskultado de lia voĉo estas malfacila momento, ĉar la voĉo de iu persono donas proksimecon al la homo, kaj kaze de mortintoj tiu aŭskultado povas esti tristiga. Mi povis sendi mian registraĵon al lia vidvino. Tre ĝojiga estis la decido de la familio organizi la Premion Maŭro la Torre kunlabore kun ILEI; jam dufoje ni povis disdoni tiun Premion, unue al Davide Astori, due al Alessandra Madella.

La pli postaj prezidintoj de ILEI estas vivantaj kaj kelkaj estas inter ni: Stefan MacGill, Duncan Charters kaj Radojica Petrović. Ni konsideru ilian agadon kun dankemo.

Inter la **gravaj momentoj** de la vivo de nia Ligo mi citu la **Trian Kolokvon pri Instruado de Esperanto**, kiu okazis en majo 2015 en Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, Svislando. Ĝi povis okazi pro la invito de la kantona registaro kaj brilis pro la kvalito de la prelegoj kaj la prestiĝo de la prelegantoj, kiuj venis el diversaj partoj de Eŭropo.

Nepre ni citu la **Jaron de la Lernanto**, kiu metis fokuson sur la laboron de la Ligo tra la jaroj 2016-2017. Multaj temoj en rilato kun lernado aperis en niaj kunvenoj, artikoloj, prelegoj. Mi substrekas la vorton **Lernado**, ĉar ni scias, ke la instruistoj ne povas fari truon en la kapo de la lernanto por meti tien sciojn, sed ke okazas kvazaŭ mirakle, ke la lernanto komprenas, ekuzas kaj memoras ion per la kontribuo de la instruisto.

Alia grava momento de la vivo de la Ligo estas la 50-a kunveno regula, en Pusano, kiu akiris la nomon **KONGRESO**, en 2017. Partoprenis proks. 200 personoj. Ni forlasis la nomon **Konferenco** kaj saltis al la nomo **Kongreso**, ĉar la programo de la kunveno fariĝis ege riĉa kaj varia. La nombro de partoprenantoj neniam estas vere stabila, sed pluraj kongresoj atingis altan nombron de kongresanoj, tion ni devas substreki.

Alia grava paŝo farita de Mireille Grosjean en 2018 estas la ekrilato kun la nova ĝenerala direktorino de **UNESKO Aŭdrey Azoulay**, kiu sekve de tiu kontakto verkis kuraĝigan salutmesaĝon por la Universala Kongreso de UEA en Lisbono. La letero de Mireille Grosjean substrekis la rezultojn ene de la Esperanto-Movado; tiuj rezultoj aperis en la mesaĝo de Azoulay, do Azoulay

rekte inspiris sin en la letero de Grosjean. Substreknendas, ke la celoj de la EO-movado evoluas paralele kun la celoj de UNESKO.

Nun en 2019 ILEI havas **43 sekciojn**. Ĉu ni fieru? Jes kaj ne. Estas granda nombro, sed kelkaj etas kaj vivetas sen vigleco. ILEI havas proksimume 800 membrojn. Ĉu ni fieru? Jes kaj ne. Tiu nombro devus havi plian nulon kaj esti ne 800 sed 8000! Konsiderante la reprezentantojn kaj la kontakt-personojn, ILEI havas piedon en **70 landoj**.

ILEI eldonas du revuojn: *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko*. Ambaŭ aperas kvarfoje jare kaj plenkolore. Tamen ilia eldonado metas la Ligon en deficitan situacion. Ni devas substreki la valoran laboron kaj regulan kontribuon de niaj du redaktoroj: Jozefo Németh por *IPR* kaj Stano Marček por *Juna Amiko*, kie forta skipo regule kontribuas. En la jaro 2018 ĉiuj kunlaborantoj de tiuj du revuoj solvis la problemon aperigi ilin en legebla formo por blinduloj: tio ankaŭ estas menciinda paŝo.



La solena malfermo de la dutaga Internacia Scienca Konferenco „Edukado en virtualaj komunumoj” – en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj en Čačak

Ni venu al la ATINGOJ de ILEI en la lastaj jaroj.

„**NI SAVU NIAJN SEMOJN**” estas agado de ILEI por kuraĝigi la savadon de diversaj eldonaĵoj en la tri gravaj bibliotekoj de nia movado: Roterdamo, La Chaux-de-Fonds kaj Vieno. Niaj kongreslibroj ekzemple iras al tiuj tri valoraj arkivejoj, same kiel al nia oficiala arkivejo en Herzberg am Harz, Germanio.

La kontrakto kun **la universitato kaj muzeo de Zaozhuang** en Ĉinio estas grava evento por la Ligo kaj faras, ke ni devas aldoni kvaran bibliotekon en la sendado de niaj eldonaĵoj.

„**KOMUNA LEGADO OKAZE DE LA TAGO DE LA LIBRO**” la 15-an de decembro.

La unua legpropono okazis decembre de 2016 kaj rilatis al poemo de Tibor Sekelj *Je kies nomo?*

La dua legpropono en 2017 rilatis al teksto de Verda Majo, la fama japandevena porpaca aktivulino.

La tria legpropono en 2018 prezentis belan poemon de nia kuba kolego Julian Hernandez Angulo.

La kvara legpropono en 2019 prezentos brilan tekston de Hector Hodler *Super*, kaj per tio ILEI altiras la atenton al tiu pioniro, kiu forpasis en 1920 en la aĝo de 32 jaroj. Espereble ni ĉiuj pli bone konatiĝos kun la pensoj de Hector Hodler tra la jaro 2020.

Tra la jaro 2019 okazas giganta tasko sub la gvidado de Doktorino Katalin Kováts: redaktado de la kvara eldono de la **MANLIBRO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO**. Ŝi trovis novajn aŭtorojn, vekis la malnovajn, vokis al provlegantoj, inter kiuj brilas nia vicprezidanto Ivan Colling kaj lia edzino Rita. En la origina plano la libro devis aperi antaŭ tiu ĉi kongreso. Tamen pro plej diversaj kialoj tio ne povis okazi. Tutcerte la nova eldono aperos antaŭ la jarfino.

Ni devas substreki la bonegan kunlaboron inter ILEI kaj du movadaj partneroj: **UEA** kaj **TEJO**. Ĝojiga afero, regula subteno de UEA al ILEI, ofta ideointerŝanĝo inter ILEI kaj TEJO. Pozitiva etoso. De informstrategio de UEA „Estraro Komunikas” naskiĝis **ESPERIGA KOMUNIKO**, kiu raportas kaj pri UEA kaj pri ILEI kaj pri TEJO.

ILEI konstatas la sukceson de la reta kurso **DUOLINGO** kaj preparis sin por akcepti novajn lernantojn, lertigante geinstruistojn. La estraro preparis tri kursojn EIT: **Esperanto-Instruista Trejnado**. Bedaŭrinde la rezulto de tio estas magra: tri personoj diplomiĝis en Eŭropo, kaj jarfine ni vidos, ĉu la 5 afrikanoj, kiuj nuntempe arde studas per la reto, sukcesos en la fina ekzameno. Same ĉi tie la fina rezulto ne devus esti ok sed okdek aŭ eĉ okcent. Ni daŭre estas en pionira fazo kaj niaj instruantoj daŭre improvizas sian instruadon sen solidaj bazaj konoj pri pedagogio kaj sen diplomo.

Nun ni malfermas plensemajnan kongreson kun la temo **LERNADO EN VIRTUALAJ KOMUNUMOJ**, eĉ se nia komunumo ĝuste nun naskiĝas fizike kaj kunvivas proksime kaj plurtage.



Kongresa ekskurso al Višegrad (Bosnio kaj Hercegovino)

La teknologia evoluo okazanta kun la apero de novaj elektronikaj iloj estas certe same grava kiel la industria revolucio de la deknaŭa jarcento. La mondo komplete ŝanĝiĝis kaj mi penas imagi la laboron de miaj antaŭuloj, kiuj prezidis la Ligon sen la reto, per paperaj leteroj kaj pakaĵoj...

La reto ebligas rapidan kontakton per retmesaĝoj, ebligas trovi rapidege plej multe da informoj, kaj plie ebligas paroladon vidalvide per Skajpo, per Zoom aŭ aliaj rimedoj. Do homoj aŭ grupo da personoj estas kvazaŭ kune sidantaj ĉe sia ekrano en sia hejmo en tia situacio. Du aŭ pli da personoj parolas al aliaj, aŭdas la aliajn, vidas la aliajn, povas kapti la ne-parolatajn mesaĝojn de la vizaĝoj kaj la intonacion de la voĉoj. Jen tio, kio estas. Kio mankas? Mankas la eblo tuŝi, meti manon sur brakon por konvinki, meti manon sur ŝultron por subteni aŭ konsoli. Mankas la sento de temperaturo, humideco, odoroj de la alia loko. Mankas la gusto de la teo, kiun iu trinkas dum la parolado (Mi ofte parolas kun nia vicprezidanto Ivan Colling, li kun sia mateo en Kuritibo, Brazilo, kaj mi kun mia japana teo en Svislando). Ni konstatas, ke en tiaj foraj kunestaj momentoj intervenas vido kaj aŭdkapablo,

kaj mankas tri aliaj sensoj: gusto, flaro kaj tuŝo. Jen la plusoj kaj minusoj de virtuala mondo.

En nia kongresa temo estas la vorto „komunumo”. La plej tradicia lerncela komunumo estas la klaso. Tiu tradicia komunumo tutcerte naskiĝis, por ke la diroj de la instruisto povu esti kaptataj de granda grupo da lernantoj, studentoj. Do ŝparema strategio. Povas ankaŭ esti iu vespera renkontiĝo de loka klubo. Okazas nun, ke la klaso, la aro da lernantoj, estas en iu loko, kaj la instruisto estas en alia loko, kaj la kontakto okazas per teknika helpilo. Ni devos en nia laboro precizigi, ĉu temas pri komuna aŭ individua uzo de teknikiloj. Ni devos diskuti: ĉu la klasa grupo en fizika kunesto stimulas aŭ bremsas la lernadon? kaj en virtuala kunteksto? Tutcerte la plej efika instrusituacio estas la programo UNU KUN UNU, kiam la studento loĝas ĉe la instruisto. Tiel la studento havas la kutiman ĉiutagan babiladon „Ĉu vi dormis bone?”, „Ĉu ni iru promeni?” kaj plie iam ajn en la tago li aŭ ŝi havas gramatikajn klarigojn plej trafajn. Tiu metodo ankaŭ estas tre multekosta, kompreneble.

Kiel lernado povas okazi sen la ĉeesto de iu gvidanto, sen aŭdado de lia forta voĉo, de ŝia persvada voĉo, kiu foje tremigas aŭ kuraĝigas la lernantojn? Kiel lernado povas okazi, kiam aperas stelo aŭ florbukedo sur via ekrano okaze de sukceso? Jen pri kio ni povos diskuti dum plena semajno. Ĉu homa kontakto helpas al lernado, aŭ ĉu eblo lerni ie iam memstare kaj propraritmte estas pli favora situacio? Ĉu la klarigoj de iu jutuba filmeto similas al klarigoj de ĉeesta gvidanto? Ĉu la lernanto ĉiam trovas la respondojn al siaj demandoj? Ĉu virtuala lernado eblas ĉie en la mondo? Ĉu iu institucio povas doni diplomon al iu fora studento, kies rezultoj povus esti akiritaj per la helpo de aliaj ĉirkaŭ li aŭ ŝi? Ĉu la preparlaboroj de la instruisto estas pli facilaj pro la helpo de teknikaĵoj, aŭ ĉu la eblaj teknikaj paneoj estas problemoj? Ĉu multaj instruistoj timas antaŭ la teknika evoluo kaj restas ĉe la sojlo? Ĉu la instruistoj kapablas sekvi la aperon de pliaj teknikaĵoj kaj kapablas uzi ilin adekvate en sia instruado? Jen pripensindaj aspektoj de nia nova mondo, jen laboro por ni en tiu ĉi kongresa semajno. Mi esperas, ke niaj diskutoj estos fruktodonaj.

Nemovada belga asocio salutis nian Kongreson

Okazas regula kunlaboro inter nia kolego Germain PIRLOT el Oostende kaj la belga sekcio de Eŭropa Asocio de Instruistoj (AEDE en la franca). La redaktorino de la bulteno de tiu sekcio decidas pri temo por iu numero,

komunikas tion al Germain, kiu diskonigas demandojn al la ILEI-membroj en Eŭropo. Tiel li jam plurfoje kolektis interesajn faktojn, kiuj aperis en la revuo de la belga sekcio de AEDE kompreneble kun mencio de Esperanto.

En julio la redaktorino de tiu organo Sinjorino Thérèse JAMIN, sekretario de la Estraro kaj redaktoro de la informbulteno, sendis al ILEI salutvortojn okaze de la Kongreso en Serbio. Bedaŭrinde tiuj salutvortoj alvenis post nia Kongreso.

Jen la salutmesaĝo de Sinjorino JAMIN:

„Kun granda plezuro mi esprimas min nome de la belga sekcio de AEDE por deziri plenan sukceson al via Kongreso. Esperanto pro sia naturo ne konas lingvajn barojn kaj kontribuas al alproksimigo de la homoj. Plie ĝi malfermas ilian koron al ekkono de la aliulo, kaj tio tre gravas en nia skuita tempo. Mi profitas la okazon por danki al ĉiuj, kolegoj kaj koleginoj, kiuj tra la helpo de nia fidela kaj entuziasma kolego Germain PIRLOT, kontribuis al la enhavo de nia bulteno komunikante multajn faktojn por multnombraj temoj, kiuj riĉigis nian trimonatan revuon.

Mi deziras al via Ligo brilan estontecon.”

Pri la kongresa temo „Lernado en virtualaj komunumoj”

Mireille GROSJEAN (Svislando)

Konkludaj rimarkoj

Virtuala lernado estu subteno al lernado, estu unu rimedo inter aliaj.

Tiu rimedo havas siajn limigojn. Ekzemple se la lernota temo postulas manlaboron, kiel por horloĝfaristo aŭ kirurgo, por tiaj kapabloj oni ne povas trejni sin per la reto, oni devas vere teni ilojn en siaj manoj. Vidi filmojn pri operacioj ne faras efikan kirurgon. Do la eblo lerni virtuale dependas de la studobjekto. Por lingvolernado la virtualaj kontaktoj bone efikas.

Per la retpaĝo www.edukado.net la novuloj povas komenci paroli en virtuala situacio kun lertuloj uzante la programon „Ekparolu”. Ili havas 30 minutojn por ekzerci sin pri parolkapablo. Tamen mankas diversaj aspektoj kiel distanco inter la korpoj; tuŝado ne eblas, flaro kaj gusto mankas; nur vido kaj aŭdo eblas. Emocioj bone povas aperi, montriĝi en skajpa kunteksto.

La kongresanaro konstatas, ke mikso valoras: kaj renkontiĝo kaj retaj kontaktoj. Ekzemple unue estu kunveno kaj poste la lernado okazu virtuale. Tia metodo alportas fruktojn. Pro la fakto, ke iu tekniko estas nova, la studentoj pli efike lernas; tion oni povis konstati.

Gravas atenti pri la cirkonstancoj, la kunteksto, pli bone oni lernu frazojn kaj ne izolitajn vortojn. La lingvo estas konstruaĵo, ne simpla amaso da ŝtonoj.

Intima ILEI-Kongreso

Aurora BUTE (Rumanio)

En la ĉi-jara Kongreso de ILEI kiu okazis en Ĉaĉak, Serbio, partoprenis 50 esperantistoj, do ĝi estis vere intima.

La solena malfermo okazis en la Fakultato pri Teknikaj Sciencoj, kie partoprenis la vicurbestro de Ĉaĉak, s-ro Vladan MILIĆ, la dekanino, s-ino Danijela MILOŠEVIĆ, kaj aliaj universitatoj. La virina koruso kantis la himnon kaj ni kunkantis, la etoso estis solena.

Tri apartajn ecojn mi ŝatus emfazi rilate la kongreson:

1. Tre serioza konferenco en la Fakultato pri Teknikaj Sciencoj.
2. Nova programero, ludo, per kiu ni kontrolis niajn sciojn pri Esperantujo, specife pri ILEI.
3. Du tuttagaj ekskursoj, ambaŭ mirindaj.

La temo de la Konferenco estis la kongresa temo: *Lernado en virtualaj komunumoj*. Kvankam estis somera feriaro, partoprenis dek kvin universitatoj kaj studentoj, kiuj prelegis en la serba kaj la angla (kun Esperantlingva traduko), kaj en Esperanto, sen traduko al la serba, ĉar la publiko jam komprenis la internacian lingvon.

Pro la fakto, ke la Konferenco prezentis pli ol dek prelegojn, ĝi fariĝis integra parto de la programo de la Teknika Altlernejo, kie la Kongreso okazis. Kaj la universitatoj kaj la studentoj tre serioze pritraktis la Konferencon, prezentis interesajn prelegojn kaj oni facile rimarkis ilian engaĝiĝon en la afero. Oni bone vidis kaj sentis, ke la ILEI-estrarano pri kongresoj laboris iam en la Fakultato kaj do, estis kolego de la dumkonferencaj prelegintoj.

La Kongreso celebris la 70-jariĝon de la Ligo per aparta programero, ludvespero, kiun proponis la prezidanto. Temis fakte pri tre variaj tipoj de ekzercoj:

- akrostikoj,
- parigoj sur diversaj temoj: urboj kaj eventoj, famuloj, mallongigoj-sigloj,
- vicoj de vortoj en kiuj ni devis trovi ĉu la fremdulon, ĉu la komunan nomon, landon, urbon k.a.
- kvizo.

Parton de la informoj ni aŭdis dum la inaŭgura prelego de la prezidanto, aliajn sciojn devintus ni mem koni el la historio de la Ligo kaj pri la kulturo de Esperanto.

La grupoj konsistis el 4 personoj: progresanto, komencanto kaj aliaj du esperantistoj, ĉiuj el malsamaj landoj. Komence ŝajnis esti ludo, sed evidentiĝis, ke necesis fundaj konoj pri la vivo de la Ligo, pri Esperantujo. Problemo estis la nomoj de delonge eksaj ILEI-prezidantoj, kiujn ni ne konis persone. Estis demandoj sufiĉe malfacilaj, kiel *Kie okazis la UK de UEA en 1949? Eksĝenerala sekretario de UN? Kio komuna: Hasel Green - Stefan MacGill – Bradley MacDonald – Michael Leon?, Du gefratoj estas honoraj membroj de ILEI, skribu ilian familian nomon* ktp.

Nu, ne estis surprizo, ke la gajninta grupo estis tiu de Stefan MacGill, kiu, kiel delonga ILEI-ano, eĉ prezidanto, kapablis trovi la plej multajn ĝustajn respondojn. Ricevis donaceton la ĉeestintoj, kiuj estas sepdekjaraj, same kiel la Ligo.

Dimanĉe ni krozis sur la rivero Moravo kaj vizitis du monaĥinejojn, dumhistorie kaŝitajn inter montoj, for de la imperioj, kaj kie konserviĝis la lingvo kaj la serba kulturo. Merkredon ni krozis sur la rivero Drino, kie ni ekstaziĝis antaŭ la belegaj interkrutejoj. Akvoj inter la montoj ĉiam oferas belegajn vidindaĵojn!

Konklude, estis bela kongreso en bela lando, kun partoprenantoj el 19 landoj kaj 3 kontinentoj. Aparte menciindas la partopreno de azianoj kaj usonanoj, kiuj transiris marojn kaj oceanojn por alveni al Serbio. Brave al ili, veraj esperantistoj! Ne gravas la mondangulo, gravas la Esperanto-aranĝo!

Restas demandoj, al kiuj mi ne kapablas respondi: kial ne estis kun ni la famuloj, kiuj kutime ne malĉeestas en la ILEI-kongresoj, kial ne venis la najbaroj, kiuj devintus trapasi nur unu-du limojn?...

Disvastigu la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto tra la retmedio

Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio)

Estimataj s-inoj kaj s-roj, karaj geamikoj!

Mi ege bedaŭras, ke mi ne povas ĉeesti la Kongreson, tamen mia koro ĉiam estas kun vi.

Mi ege dankas kaj gratulas al ILEI pro tio, ke la kongresa temo „Lernado en virtualaj komunumoj” bone kongruas kun la celoj de Unesko. Kiel redaktoro de la Esperanto-versio de *Unesko-Kuriero*, mi ŝatus diskuti kun vi pri la disvastigo de idealoj kaj valoroj de Unesko per Esperanto en la retmedio. Mi parolos pri tri punktoj:

Retmedio faciligis la aperigon de *Unesko-Kuriero*

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko. Ĝi ekaperis en 1948. Kiel grava komunikilo la revuo ludas gvidan rolon por disvolvi idealojn kaj valorojn de Unesko. Dum longa tempo esperantistoj multfoje proponadis, ke Unesko uzu Esperanton en la eldonado de *Unesko-Kuriero*. Post populariĝo de interreto, multaj esperantistoj sendis proponajn mesaĝojn al Unesko. Tio ege ĝenis la funkciulojn de Unesko, ĉar tiamaj teknikistoj ankoraŭ ne kapablis bloki la spamojn. En la jaro 2000, Unesko-funkciuloj devige petis la Ĝeneralan Direktoron Osmo BULLER haltigi la retmesaĝan bombardon de Unesko. Osmo publikigis malferman leteron en la hungara revuo *Eventoj*, n-ro 182, en la jaro 2000. Laŭ lia alvoko, oni ĉesigis retmesaĝan bombardon de Unesko. En publika letero, Osmo skribis, ke Unesko pretus permesi eldonon de la Kuriero en Esperanto, se UEA povus financi ĉion. Ekde tiam oni ne plu petis Uneskon eldoni la Kurieron en Esperanto, ĉar UEA ne kapablis eldoni ĝin pro manko de financo kaj laborforto.

Kaj finfine la populariĝo de interreto faciligis la realigon de nia longtempa revo. La Esperanta versio de *Unesko-Kuriero* estis oficiale publikigita en julio 2017 dum la 102-a UK. Kaj mi estis honorigita kiel „esperantisto 2017”. Mi konfesas, ke mi povintus fari nenion sen la reta medio.

Nova progreso de *Unesko-Kuriero*

Danke al la reta medio, la eldono de *Unesko-Kuriero* multe progresas. La numeroj de *Unesko-Kuriero* en Esperanto aperas en papera, bita kaj sona versioj. La bita kaj sona versioj estas facile elŝuteblaj ĉe la Unesko-retejo, UEA-retejo kaj la retejo de *Unesko-Kuriero* en Esperanto. UEA kaj la landaj kaj fakaj asocioj aranĝis multajn prelegojn pri Unesko kaj la Kuriero en Universalaj kaj landaj kongresoj. La Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ino Audrey AZOULAY sendis gratulan leteron al la UK en 2018. En sia letero ŝi menciis la eldonon de *Unesko-Kuriero* en Esperanto kaj alte taksis la valoron de la internacia lingvo Esperanto. Tio estas historia atingo de nia lingvo ĉe Unesko en la lasta jardeko danke al la kontribuo de Mirejo, la ILEI-prezidantino. Dennis KEEFE, Lee JUNGKEE, François LO JACOMO kaj Trezoro Huang Yinbao, respektive en Koreio, Francio, Hispanio kaj Ĉinio, okazigis Esperanto-kursojn surbaze de *Unesko-Kuriero*. En 2018, miaj kolegoj kaj mi estis invititaj de Unesko ĉeesti la unuan Forumon de *Unesko-Kuriero* en la Unesko-sidejo. Multaj bildoj kaj artikoloj pri la Esperantaj versioj de *Unesko-Kuriero* aperis en paperaj kaj retaj amaskomunikiloj. Ni donacas paperajn *Unesko-Kurierojn* al gravuloj de lokaj registaroj kaj diversaj lernejoj kun la celo influi ilin.

La ĉinlingva teamo de *Unesko-Kuriero* kreis amaskomunikilon sur saĝtelefonoj, por reklami Esperanton. Sur la amaskomunikilo ni publikigis interesajn artikolojn por allogi diversajn legantojn, kaj al ĉiuj artikoloj ni enmetadis etajn reklamojn kaj retajn ligilojn por prezenti Esperanton. Ĝis nun la Esperanto-reklamoj estas legitaj jam pli ol 30 milionojn da fojoj.

Disvastigu la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto tra la retmedio

La oficiala eldonanto de *Unesko-Kuriero* estas UEA. Mi estas nur iniciatinto kaj mem-financa realiganto de la projekto. Post la aperigo de la 1-a numero de *Unesko-Kuriero*, mi jam en pluraj prelegoj deklaris, ke UEA ne celas liveri al esperantistoj *Unesko-Kurieron* nur kiel simplan legaĵon, ĉar ofte mankas al ni sufiĉa tempo por legi amasojn da diversaj legaĵoj. Ni fakte celas kontribui al la realigo de la celoj de Unesko. Dum longa tempo niaj postuloj kaj proponoj al Unesko, precipe la retmesaĝaj bombardoj ĝenis Unesko-funkciulojn, tio malkontentigis Uneskon. Kaj la eldono de *Unesko-Kuriero* helpas kaj kontentigas Uneskon. Ĝi plibonigas la rilaton inter UEA kaj Unesko.

Mi kredas, ke preskaŭ ĉiuj esperantistoj esperas, ke Unesko akceptu Esperanton kiel la sepan oficialan lingvon. Por realigi tiun celon, ni devas diversmaniere vidigi al Unesko la utilecon de Esperanto per niaj agadoj. Ĝuste pro tio UEA lanĉis la projekton „Disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto”. UEA alvokas al landaj, lokaj kaj fakaj Esperanto-organizoj aŭ grupoj kaj Esperanto-parolantoj tra la tuta mondo kunlabori per diversaj manieroj, ekzemple:

1. Traduku artikolojn el la Kuriero al via nacia lingvo kaj publikigu ilin, se via gepatra lingvo ne estas unu el tiuj de UN.
2. Okazigu kursojn surbaze de *Unesko-Kuriero*.
3. Okazigu forumojn, seminariojn pri Unesko aŭ pri *Unesko-Kuriero*.
4. Kreu rubrikojn de *Unesko-Kuriero* sur la retpaĝoj de viaj landaj, lokaj kaj fakaj Esperanto-asocioj por helpi la legantojn.
5. Publikigu retan ligilon de *Unesko-Kuriero* kaj bildojn de la Kuriero en viaj personaj blogoj, fejsbukaj kaj tviteraj paĝoj ktp, por montri al la publiko la valoron de Unesko kaj la utilecon de la internacia lingvo Esperanto.
6. Aliĝu al nia Esperanto-Teamo. La Esperanto-Teamo de *Unesko-Kuriero* jam havas ĉirkaŭ 70 volontulajn membrojn el 30 landoj en 5 kontinentoj. Tamen UEA preferas, ke pli da Esperanto-parolantoj havu ŝancon kontribui al tradukado, provlegado, voĉlegado, trejnado, produktado, financado kaj disvastigado de la Kuriero. Interesiĝantoj bv. kontakti la redaktoron kaj kunordiganton Trezoro Huang Yinbao <trezoro@qq.com>.
7. Proponu kaj sugestu. UEA konstruis bonan rilaton kun Unesko per la eldono de la Kuriero. Ni planas kontribui al Unesko en pli vasta kampo. Kiel plu fari? Mi kredas, ke ĉiuj kongresanoj havas ideojn aŭ sugestojn. Mi invitas vin diskuti pri tio en la kongreso aŭ sendi viajn proponojn kaj sugestojn al mi.

Fine, kaptante la ŝancon, mi kore dankas al la prezidantino Mirejo kaj la Estraro, ke ILEI menciis *Unesko-Kurieron* en la kongresa rezolucio 2017. Mi esperas, ke ankaŭ ĉi-jara kongresa rezolucio iel tuŝos la temon pri la projekto de UEA „Disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto”.

Koran dankon!

Trezoro Huang Yinbao
Redaktoro de Unesko-Kuriero. Estrarano de UEA

ILEI forte aperis en Lahtio dum la UK

de Mireille GROSJEAN, prezidanto

Foje oni devas atendi plenan jaron por konkretigi proponon, foje tio eblas en du tagoj. Tian sukceson en rapida maniero ni atingis por venigi al Lahtio MIL ekzemplerojn de *Juna Amiko*, cele al vasta disdonado al MIL gekongresanoj. Komence de julio venis la ideo; Stano MARČEK la redaktoro anoncis, ke li havas 1500 en sia kelo kaj ke li iros al Litovio por la Baltaj Esperanto-Tagoj (BET), kie kuvenos 500 homoj. Do li pretis transporti tiun enorman kvanton al Litovio kaj zorgi pri la disdono de po unu ekzemplero al la partoprenantoj de BET. Sed restis alia problemo: porti mil ekzemplerojn de JA al Finnlando! Stano sciigis al ni la ekiron de buso al Lahtio por postBETA migrado el Litovio al la UK. Tuj ni kontaktis la estron de tiu vojaĝo, kiu konsentis, ke kelkaj skatoloj estu en la malsupra pakaĵujo de la buso. La revuoj bone atingis Lahtion kaj stokoj aperis sur la tabloj de la akceptejo, kun ekzempleroj de diversaj numeroj ne malnovaj. Ĉiuj malaperis en la valizojn de la kongresanoj.

Kiel kutime, okaze de la malfermo la prezidanto de ILEI sidis sur la podio kaj havis kelkajn minutojn por alparoli la kongresanaron. Ŝi elektis fari prezenton de la diversaj atingoj de la Ligo en la lastaj jaroj pro la 70-jariĝo de la Ligo. Ŝi aŭdis poste pozitivajn rimarkojn pri tiu parolado.

Kiel eblas laŭ la statuto de UEA, ILEI rajtas havi Komitatanon A. Ekde 2013 Mireille GROSJEAN havas tiun oficon, kiu devigas ŝin iri al ĉiu UK. Jam de 1998 ŝi membras en la Komitato de UEA, unue nome de Svislando. Ŝi intense sekvis la elektojn de la estraro de UEA en 2019, post ricevo de sugestoj kaj premoj, ke ŝi kandidatiĝu por tiu instanco. Tamen ŝi decidis resti fidela al ILEI. Substrekindas tre favora fakto, ke eks-prezidanto de ILEI D-ro Duncan CHARTERS estis elektita nova prezidanto de UEA. Li mem estos la ligilo al la Ligo, la regula observanto de UEA en nia laboro.

Kiel kutime ILEI havis sian standon en la enirhalo. En la apuda stando varbis kelkaj kebekanoj pri la UK en Montrealo, Kanado, en 2020 kaj ILEI povis paralele menciigi sian Kongreson en Kanado same, en Kebekurbo. La distanco inter la du urboj estas 260 km. Bonvole pripensu pri salto al Kanado por viziti unue la ILEI-Kongreson kaj poste la UK-on. Komuna buso transportos vin senprobleme.

La Tago de la Lernado estas kutima programero dum UK. Ĝi okazas marde kaj en Lahtio okazis tio, tamen en ne favora loko, tiel ke ne multaj

kongresanoj trovis la ĝustan lokon. Ni havis prelegon per skajpo de D-ino Hab. Ilona Koutny el Poznano, Pollando, kiu prezentis la gravan agadon de Prof. István Szerdahelyi kaj anoncis la komencon de unujara lertigado por instruistoj en la Universitato Adam Mickiewicz. Ni ricevis informojn pri la instruisistemo de la gastiganta lando Finnlando fare de Sylvia Hämäläinen. D-ino Katalin Kováts prezentis du aliancantojn: ILEI kaj *edukado.net* kaj ilian harmonian kunlaboron. Mónika Molnár interesis la publikon pri la Freinet-pedagogio, kiu ebligas al infanoj kreski kaj akiri sciojn en trankvila kaj fruktodona etoso. François Lo Jacomo skizis la rilatojn inter ILEI kaj UNESKO. Pro la 70-jariĝo de la Ligo ni aŭdis la historion de la itala sekcio fare de Renato Corsetti kaj la historion de la usona Esperanto-movado fare de Duncan Charters. Granda danko iras al Marija Belošević, kiu organizis la programon de tiu grava programero de la UK.

ILEI havas kadre de la UK kunsidon por informi la kongresanojn pri la vivo kaj laboro de la Ligo. Tiun kunvenon gvidis la prezidanto, kiu prezentis la diversajn facetojn de la sukcesoj kaj malfacilaĵoj de la Ligo.

En tiaj kunvenoj homoj venas pro la loko, la kongresa temo, por partopreni en prelegoj kaj debatoj; ili venas al la kerno. Sed ofte la plej gravaj aferoj okazas en la koridoroj, inter la kongresanoj. Por ILEI okazis ankaŭ, ke la prezidantino Mireille Grosjean renkontis la prezidantaron de LIBE, la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Temas pri Sinjorino Nedeljka Ložajić. Mireille proponis verki „kunlaboran interkonsenton”. Ŝi povis submeti ĝin al la estraro kaj poste prezenti tiun dokumenton en la kunsido de LIBE kaj post unu aldono la dokumento estis akceptita. Jen grava paŝo por ambaŭ Ligoj. La dokumento troviĝas en la ĉefpaĝo de ILEI.


En Lahtio partoprenis Suzanne Roy, kiu respondecas pri la organizado de nia Kongreso 2020 en Kebekurbo. Kontaktoj okazis en pozitiva kaj efika etoso. Ni esperas havi tie grandan kaj buntan kongreson.

Nova retejo por lernantoj

de Anna LOWENSTEIN (*Unuiĝinta Reĝlando*),
anna.lowenstein@esperanto.org

Ĉu vi aŭdis pri la nova facillingva retejo de UEA intencita por lernantoj? Se vi ne jam scias, vi trovos ĝin ĉe <https://uea.facila.org>. Ĝi estas celita ne al instruistoj, sed al lernantoj – sed kompreneble multaj instruistoj jam trovas

ĝin utila, ĉar ĝi enhavas multajn mallongajn artikolojn taŭgajn por prezentado dum Esperanto-leciono.



La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la EOMovado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, facillingvaj filmetoj, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo „Niaj legantoj”, kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de Kontakto, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas

bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: <https://uea.facila.org/vortlisto/>. Ĉiuj artikoloj estas mallongaj kun ne pli ol 400 vortoj. Lernantoj ne volas legi longajn artikolojn! Nur la rubriko „Legajoj” rajtas akcepti iom pli longajn artikolojn, ĝis maksimume 600 vortoj.

Uea.facila kunlaboras kun ILEI kaj *Juna Amiko*. Ĝi jam aperigis kelkajn artikolojn el Juna amiko, kies redaktoro kompreneble estas invitita reciproke utiligi artikolojn el uea.facila.

Kiel la legantoj de IPR povas kunlabori kun la nova retejo? En pluraj manieroj. Plej grave, prezentu ĝin al viaj lernantoj kaj kuraĝigu ilin mem legi ĝin. Proponu al ili, ke ili sendu sian sinprezenton kun foto por la rubriko „Niaj legantoj”, kaj ke ili aldonu komentojn sub la artikoloj.

Krome mi, kiel redaktoro, bonvenigos kontribuojn de la legantoj de IPR. Se estas malfacile por vi verki facile, ne maltrankviliĝu: mi mem volonte redaktos kaj simpligos artikolojn senditajn por uea.facila. Mi ĉiam tamen petos aprobon de la verkinto antaŭ ol aperigi redaktitan artikolon sub ties nomo.

Universitata kunlaboro en la instruado de Esperanto inter Ĉinio kaj Pollando

de Ilona KOUTNY (Pollando)

En 2016 ekestis la ĉinaj kontaktoj de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kiam Xie Longfei, gvida profesoro el Pekina privata universitato vizitis Eŭropon por trovi universitatajn kontaktojn. En tiu oktobro Ilona Koutny, gvidanto de IS kaj ŝia edzo Zbigniew Galor veturis al Ĉinio kaj prelegis ne nur en la Pekina Lingva Universitato, kie Li Weilun instruas Esperanton kaj dum la Azia Kongreso, sed ankaŭ en la Zaozhuang-a Universitato (Provinco Ŝandongo). En ZU jam tiam okazis instruado de Esperanto fare de eksterlandaj kolegoj, kiuj instruis sian gepatran lingvon kaj Esperanton: la korea Bak Giwan kaj la japana Sasaki Teruhiro. En ZU funkcias ankaŭ tre granda kaj moderna Esperanta Biblioteko.

ZU lanĉis 4-jaran EO-fakon en la studjaro 2018/19, kie 25 studentoj finis



sian unuan jaron. Ankaŭ nun eksterlandaj e-istaj instruistoj kontribuas al la programo, i.a. d-ro Maciej Zięba, orientalista el Pollando. La universitataj gvidantoj planas, ke kelkaj studentoj post bakalaŭriĝo povos daŭrigi siajn studojn en magistra nivelo en la pola Adam Mickiewicz-Universitato, kie jam de 21 jaroj funkcias la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj. Ĉina delegacio alvenis en Eŭropon en julio 2019, post la UK ili veturis al Poznano, Pollando, por preparoli la kunlaboron kun prof. Ilona Koutny, gvidanto de IS.

La 28-an de julio la rektoro de la Zaozhuang-a Universitato, Prof. CAO Shengqiang, kaj la vicrektoro de AMU, Prof. Ryszard Naskręcki, subskribis kontrakton pri kunlaboro

inter la du universitatoj, kiu ĉefe celas la instruadon de esperantologio.

Surfote: La rektoroj kaj Ilona Koutny antaŭ la statuo de la fama pola poeto Adam Mickiewicz en AMU

El la landoj kaj sekcioj

Albanio

Reago

2019-05-11: Hodiaŭ alvenis IPR-numero 1 de 2019, kie aperas via artikolo okaze de la 70-jariĝo de ILEI. Tre interesa.

La „ŝlosilo” albana aperis dum 20 jaroj de la pasinta jarcento fare de inĝeniero Ĉefo FICO, la dua ŝlosilo aperis en la sepdekaj jaroj en Makedonio albanlingve fare de Husni ZEMOVSKI. Tria ŝlosilo pli ampleksa aperis en la naŭdekaj jaroj fare de Agim PERAJ. Dume albanoj disponas pri kvar sinsekvaj lernolibroj verkitaj de Vasil PISTOLI, Zef MJEDA, Bardhyl SELIMI kaj Gjergji GUSHO. La unuaj tri estas eldonitaj en kvanto de pli ol 1000 ekzempleroj.

Regula instruado komenciĝis dum la sesdekaj jaroj kaj poste kontinue. Dankon pro via atento.

Bardhyl SELIMI

Germanio

Esperanto-kurso en ŝtata popola altlernejo



La ŝtata popola altlernejo en Frankfurto ĉe Majno (VHS Frankfurt am Main) en majo okazigis Esperanto-kurson dum tri semajnfinoj (de la 4-a ĝis la 24-a de majo). La popola altlernejo en Frankfurto estas la plej granda tia institucio en la centragermana lando Hesio kaj danke al tio havis la eblon, tre grandskale kaj efike varbadi por la maja Esperanto-kurso. En la kurso partoprenis kvar personoj, el kiuj du estis germanoj, unu persono poldevena kaj unu el Alĝerio. La partoprenantoj interesiĝis interalie pri la lingvo mem, pri la internacia Esperanto-komunumo kaj la Esperanto-kulturo. Krom lingvolernado estis ankaŭ prezentataj specimenoj de Esperantaj muziko kaj literaturo. Oni lernis ankaŭ iomete pri la historio kaj aktualeco de la Esperanto-movado. La instruado mem okazis en la germana, sed jam post du instrutagoj la partoprenantoj mem ekuzis pli kaj pli Esperanton kaj fondis retan grupon por Esperanto-interŝanĝo.

La kurso realiĝis laŭ iniciato de la kursestro Martin PTASIŃSKI (kiu samtempe estas kursestro por la pola kaj ĉeĥa lingvoj ĉe VHS Frankfurto), kaj la estrino de la lingva fakultato de VHS Frankfurto, kiu havas tre favoran

sintenon por nia lingvo. Estas planata daŭriga kurso (ekonta en novembro), kiu ankaŭ entenu komunan festadon dum la Zamenhof-tago 2019. El la kvar partoprenintoj jam du aliĝis definitive al tiu daŭriga kurso.

Martin PTASIŃSKI (estrarano de AGEI)

Hungario

250+ FAKAJ ESPERANTO-VORTAROJ EN LA RETO!

Pli ol 250 Esperantaj fakaj vortaroj kaj terminaroj estas troveblaj en la unika kolektaĵo de Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB, kiun ni prizorgas jam de multaj jaroj. La vortaroj kaj terminaroj estas libere uzeblaj, legeblaj kaj elŝuteblaj en interreto!

Malavantaĝo de interreto estas ĝia nestabila karaktero, multaj materialoj en la reto ofte malaperas kaj estas forviŝataj, do retaj listoj kutime enhavas amason da mortaj ligoj. - En la aktivula grupo ĉirkaŭ la retejo *eventoj.hu* ni aktualigis la supran vortaran kolekton kaj ni faris sekurkopion pri multaj materialoj, ekde nun deponataj en nia servilo.

Ni estas kontentaj, ke ĉiuj 300+ ligoj en la kolektaĵo estas aktualaj kaj atingeblaj.

Adreso de la vortara kolekto: <http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/>.

SZILVÁSI László

Kroatio

Esperanto - nemateria kultura heredaĵo

La 11-an de februaro 2019 Esperanto ricevis gravan socian rekonon en Kroatio. Per dokumento de la Administrejo pri protekto de kultura heredaĵo, kiu funkcias ĉe la Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio, „la tradicio de Esperanto en Kroatio” ricevis statuson de nemateria kultura havaĵo kaj estis notita en la Registro de kulturaj havaĵoj – Listo de protektitaj kulturaj havaĵoj sub la numero Z-7298. Tiamaniere Kroatio fariĝis la dua lando (post Pollando), en kiu Esperanto ricevis similan socian rekonon.

La administrejo pri protekto de kultura heredaĵo preskribis aron da taskoj por konservi, diskonigi kaj protekti la menciitan havaĵon kaj eviti ĝian malaperon aŭ detruon. En ĝia dokumento troviĝas listo de 24 portantoj de la menciita nemateria kultura havaĵo, kiuj transprenis ĉiujn preskribitajn taskojn.

Verŝajne la plej gravan rolon estonte ludos Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), kiu funkcias en Đurđevac kiel nacia Esperanto-arkivo. La arkivo kreskas jam kvardek jarojn, kaj precize en 2019 DEC malfermos sian novan sidejon. Pro la enorma kresko de la deponita arkiva materialo, helpe de eksterlandaj kaj enlandaj donacintoj, en 2017 estis entreprenita konstruado

de nova domo, en kiu la arkivaĵoj trovos sian taŭgan lokon. La domo estos oficiale inaŭgurita la 22-an de septembro per starigo de memortabulo al esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj ebligis ĝian konstruadon. La unuajn paŝojn en la diskonigo de Esperanto laŭ la kriterioj de la Administrejo pri protekto de kultura heredaĵo faris ankaŭ Bjelovara Esperantista Societo, kiu dum septembro organizos festadon kaj ekspozicion en la Urba muzeo pri „110 jaroj de Esperanto en Bjelovar” kaj eldonos ampleksan plenkoloran monografion pri tiu jubileo, kiun financas la urbaj kaj departementaj instancoj.

Marija JERKOVIĆ

Serbio

Laŭ la spuroj de Tibor SEKELJ

E-societo „Tibor Sekelj” el Subotica en sia agado lastatempe denove fokusiĝas al malfermo al la neesperantista mondo kaj allogo de novaj interesigantoj pri Esperanto.

Ekde aŭtuno 2018 ni jam havis plurajn malfermajn kunvenojn, pli-malpli sukcesajn. En septembro 2018 en la Urba Biblioteko ni organizis prezenton de la „Muzeo de la homo” – noveldonita katalogo de la Urba Muzeo el Senta pri la heredaĵo de Tibor SEKELJ, okaze de la 30-a datreveno de lia forpaso. En novembro kaj decembro la ĉefaj temoj de niaj aranĝoj denove estis ligitaj al la fama verkisto kaj mondvojaĝanto Tibor SEKELJ.

Fine de la jaro, kune kun la Politeknika Lernejo (faka mezlernejo), ni lanĉis konkurson por gelernantoj de bazaj kaj mezlernejoj en Subotica kaj ĉirkaŭaĵo por alvoki ilin legi iun verkon de Tibor SEKELJ (vojaĝpriskribon, romanon, novelon aŭ poemon) kaj, inspirite de la elektita legaĵo, verki unu aŭ pli da konkursaĵoj: literaturan (serbe aŭ hungare), pentroartan aŭ fotografajon.

La konkurso finiĝis la 28-an de marto 2019 per solena premio kun ekspozicio de ĉiuj verkoj en la Politeknika Lernejo. Krom la trilingva diplomo (Esperanta-serba-hungara) ĉiu gajninto ricevis donacojn ne nur de la Lernejo kaj de la E-societo, sed ankaŭ po unu libron de Tibor SEKELJ aŭ libron pri li, plejparte danke al la grandanima donaco de Erĵebet SEKELJ (Erzsébet SZÉKELY), lia vidvino. La E-societo disdonadis al la gajnintoj kaj iliaj mentoroj lernolibron de Esperanto de Antonije SEKELJ, frato de Tibor. La konkurson partoprenis 15 mentoroj kun 98 gelernantoj el 11 lernejoj. Entute alvenis 117 verkoj kaj 38 el ili estis premiitaj per 1-a, 2-a aŭ 3-a premio, aŭ speciala mencio (en iuj kategorioj la ĵurio aljuĝis dividitajn, t.e. plurajn premiojn). La ekspozicio estis spektebla en la Lernejo dum 6 tagoj.

Pri la konkurso ni plurfoje informadis en amaskomunikiloj: en la solena malfermo de la ekspozicio partoprenis 2 lokaj TV-stacioj, la albumoj de ĉiuj verkoj estas publikigitaj sur Facebook-paĝo de la E-societo, ĉiuj informoj pri la konkurso aperis ankaŭ sur la retpaĝo de la Lernejo kun foto-albumo pri la ekspozicio kaj premiado.



Nia lasta malferma evento, informa-amuza programo okazis la 11-an de aprilo, tuj post la jarkunveno de la E-societo. Pli ol duono de la nemultnombra publiko estis nemembroj: interesiĝantoj aŭ simpatiantoj. La programo estis serblingva: unue raporto pri la Sekelj-konkurso kun fotoj de verkoj kaj video-registraĵo pri la premiado, kiun sekvis mallonga prezento de la Internacia Lingvo kun kvizo kaj kantado de esperantigitaj popolkantoj. La ĉeestantoj ricevis la tekstojn kun notoj, kaj Blanka LASLO, studento de violonĉelo, montris la melodion kaj poste akompanis la komunan kantadon de hungara, slovaka, kroata, franca, angla kantoj - Esperantlingve.

Pere de la Sekelj-konkurso ni konatiĝis kun kelkaj mentoroj, kaj danke al tio, tri el ili volonte partoprenis ankaŭ la polan pentroartan konkurson „Pollando miaokule”, por infanoj de 5 ĝis 10 jaroj, por kio la tradukon de priskriboj kaj la sendadon realigis la E-societo mem. Ni atendas la rezultojn.

Aranka LASLO

Usono

NASK 2019

Somera instruado de Esperanto en Usono, en nivelo de universitato, havas 50-jaran historion, kiun oni festis ĉi-somere ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), en Raleigh, Norda Karolino. La kursaro okazis ĉe la Universitato William Peace, historia loko en la urbocentro de Raleigh, kiu mem estas historia urbo en Usono. Partoprenis 88 lernantoj, ĉefe el Usono (sed ne entute), kaj teamo de 10 homoj (instruistoj kaj gvidantoj). Sub la administrado de Ellen EDDY, instruis István ERTL, Bertilo WENNERGREN, Birke DOCKHORN, Alena ADLER kaj Hans BECKLIN. Gast-prelegis pri instruado de Esperanto D-ro Duncan CHARTERS kaj Thomas ALEXANDER. Oni prezentis du Superajn kursojn (unu pri lingvo kaj literaturo, unu pri gramatiko), du Meznivelajn (unu pri gramatiko kaj unu pri scenaj artoj), kaj unu Postbazan. Brian HARMON estis la help-instruisto, kiu prizorgis eksterlecionajn eventojn, kaj mi ĉeestis kiel ĝenerala organizanto kaj helpanto. La grupo ĉi-jare estis rekorde granda en la tuta historio de la programo.



Universitata somera instruado de Esperanto en Usono unue okazis en North Adams, Masasuceto, en 1969, kie Duncan CHARTERS instruis. La kursaro, kiu nun havas la nomon NASK, komenciĝis en San-Francisko, Kalifornio, sub la gvidado de Cathy SCHULZE, en 1970. Ĝi fariĝis konata kiel „La San-Franciska Kursaro” kaj restis en la sama urbo ĝis 2001. Post tiu jaro ĝi iris al kelkaj diversaj lokoj en Usono, kaj unufoje en Kanado, ĝis decido resti en Raleigh pro la bonaj rimedoj (loĝado, manĝado, klasĉambroj, vifio, proksimo al restoracioj kaj butikoj ktp). NASK estos en Raleigh minimume ĝis 2022.

En la komenco la somera kursaro estis oficiala universitata kurso, valida por apliko al diplomo (t.e., usone, „por-kredita”) kaj tri-semajna. Sed montriĝis finfine ke la kosto estas neeltenebla (oni devas krompagi por tia „kredito”) kaj malmultaj homoj kapablis liberiĝi por tri-semajna foresto somere. En 2011 ĝi fariĝis universitata „lingvo-seminario”, 8-taga, kaj ekde tiam spertas konstantan kreskon.

Ĉi-jare estis eksterordinare kaj pro la festado de la 50-a jaro (por kio estis granda kuko kaj fest-paroladoj de Duncan CHARTERS, Derek ROFF kaj Ellen EDDY), kaj pro la ĉeesto de du gravaj gastoj: la fratinoj Margaret ZALESKI-ZAMENHOF kaj Hanna ZARUSKI-ZAMENHOF, pranepinoj de d-ro Zamenhof mem.

Margaret estis lernanto kaj eĉ ekzameniĝis laŭ KER dum la kursaro. Hanna kaj la edzo, kiuj loĝas en Usono, venis kaj gastis dum la unuaj du tagoj. En la enkonduka kunsido, Hanna kaj Margaret bele prezentis sin al la grupo. En la dua vespero, ili prezentis (anglalingve, pro tio ke Hanna ne parolas Esperanton) programon pri la familiaj perspektivoj rilate al la historio kaj filozofio de Esperanto kaj la rolo de la praavo.

Hanna iom detale parolis pri Homaranismo kaj vekis sufiĉan intereson pri la temo kaj la ideo.

Sub gvidado de Katalin KOVÁTS kaj Duncan CHARTERS, dek homoj ekzameniĝis laŭ KER – unu je B1 kompleta, du je B2 kompleta, unu je B2 parola, 5 je C1 kompleta kaj 1 je C1 parola. Indas menci, ke Katalin ĉeestis ĉi-foje kiel partoprenanto, ne kiel instruisto... kaj finfine ricevis diplomon pri sukcesa lernado en la Usona kursaro.

En 2020 la Usona kursaro estos nur 5-taga, kun nur 3 niveloj, kaj ni antaŭvidas malpli grandan grupon. Ni supozas, ke multaj homoj en Usono kaj Kanado elektos inter NASK kaj la UK en Montrealo.

Lee MILLER

Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI

AKROSTIKO 1

Nomo de la redaktoro de *Juna Amiko*
Individua nomo de la dua gajninto de la premio Maŭro la Torre
.....
Fama EO-instruisto kaj pedagogo
Eta iberia teritorio nek hispana nek portugala
Devenlando de la eks-prezidanto de ILEI Maŭro la Torre
Aro de tekstaj artaj verkoj
Teksto, kiu priskribas devigajn agojn

LI ESTIS PREZIDANTO DE ILEI

--	--	--	--	--	--	--

Maksima poentonombro: 8

AKROSTIKO 2

Lando, kie kreiĝis ILEI-sekcio en 2018
Tanganjika kaj formis novan ŝtaton Tanzanio en 1964
Tre granda
Ne volas
Lando de la ILEI-Konferenco en 2011
Lando, kie kreiĝis ILEI-sekcio en 2018
Urbo de la ILEI-Konferenco en 2013
La estas nia himno.
Pli forta ol komplimento
Litero ne esperanta
.....ulo, tamen ne ulo, sed tero

LI ESTIS PREZIDANTO DE ILEI

--	--	--	--	--	--	--	--	--	--	--

Maksima poentonombro: 11

AKROSTIKO 3

- Urbo de la Universala Kongreso 2018
- Nomo de la gajninto de la unua premio Maŭro la Torre
- Afrika lando, kie situas lernejo, kie 600 lernantoj studas Esperanton .
- Nova nomo de la budapeŝta ekzamcentro, antaŭe ITK.
- Plej vasta lando en la mondo, tamen sen ILEI-sekcio
- Digna gazeto
- Aperis post Volapuk

LI ESTIS PREZIDANTO DE ILEI

--	--	--	--	--	--	--	--

Maksimuma poentonombro: 8

AKROSTIKO 4

- Urbo de la unua ILEI-Kongreso (ne Konferenco)
- Fino de rakonto
- Ĝenro literatura
- Ampleksa novelo
- Imitado de natura bruo
- Etega lando
- Okcidenteŭropa duoninsulo
- Svisa urbo, kie situas CDELI: centro de dokumentado kaj esploro pri la lingvo internacia (sen artikolo)

LI ESTIS PREZIDANTO DE ILEI

--	--	--	--	--	--	--	--

Maksimuma poentonombro: 9

DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO - parto 8

En aprilo 2015 Luiza verkis eseon, rando de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas. La unuaj 7 partoj aperis en antaŭaj numeroj de IPR. Tiu ĉi estas la lasta parto.

LA ESPERANTISTA TURISMO

Antaŭ 10 jaroj mi opiniis, ke la plezuro de ajna vojaĝo tute ne dependas de la lingvo en kiu oni parolas dume. Mi malsamopiniis nun. La apartajn ecojn de la esperantista turismo ne igas la lingvo mem, sed la esperantista komunumo.

Sincere, dum miaj (ne tre multaj, bedaŭrinde) spertoj pri esperantista turismo, oni ofte krokodilis, aligatoris kaj eĉ kajmanumis! Ne gravas. Esperantisma turismo estas por mi aparte ĝuinda sperto, sendepende de tiaj detaloj. La esperantista turismo okazas en aparta etoso, ĉar ĝi estas precipe socia evento. Ĝia unua celo estas krei kaj plifortigi amikecojn inter homoj el diversaj landoj. Certe, oni kune admiras pejzaĝojn, spektas koncertojn kaj diverstipajn spektaklojn, vizitas muzeojn, historiajn lokojn, aŭskultas prelegojn ktp. Sed intertempe oni interŝanĝas impresojn, opiniojn, oni konatiĝas kun pensmanieroj kaj vidpunktoj de alilandanoj, oni larĝigas sian mensan horizonton... Ĉu tio ne okazas ankaŭ dum ne-esperantistaj ekskursoj? Kelkfoje ja okazas, sed nur hazarde kaj malofte.

Antaŭ kelkaj jaroj, mi partoprenis esperantistan ekskurson, dum kiu oni vizitis i.a. belegan botanikan ĝardenon apud la Morta Maro. Troviĝis tie centoj da specioj de arboj el ĉiuj kontinentoj krom Antarktiko. Neniu natura arbaro povus enhavi tiom malsimilajn speciojn de arboj; nur artefarita arbaro (t.e. botanika ĝardeno) povus aspekti tiele. La pejzaĝo antaŭ niaj okuloj estis unika kaj arteca kaj ŝajnis al ni kvazaŭ metaforo pri la lingvo Esperanto. Ni entuziasmiĝis, faris multegajn demandojn al la maljuna ĉiĉerono, kiu diris al ni: „De pli ol 30 jaroj mi ĉiĉeronas tra tiu ĉi ĝardeno. Tiom scivolemajn kaj entuziasmajn turistojn mi neniam vidis. Plej ofte la turistoj tediĝas pri miaj klarigoj post nur 10-15 minutoj kaj demandas min, kie troviĝas restoracio, ĉar ili jam volas manĝi. Studentoj pri biologio venas ĉi tien por studi la arbojn kaj faras al mi fakajn demandojn. Sed ili ne interesiĝas pri rakontoj kaj legendoj ligitaj al tiuj arboj kaj apenaŭ ĝuas la belecon de la loko. Via grupo malsimilas ĉiujn aliajn grupojn, kiujn mi konis. Kiuj vi estas? De kie vi venas?” Dum ĉ. duonhoro ni rakontis al la maljunulo pri Esperanto kaj pri la

Movado. Li diris, ke li uzos Vikipedion por akiri pli da informoj pri nia grupo.

Mi povas rakonti ankoraŭ unu personan sperton. Antaŭ la jaro 2005 mi jam vizitis la svisan alpmontaron minimume 10 fojojn kun mia familio. Ĉiufoje ni restis tie po ĉ. monaton kaj promenis tie per piede, per trajno, per buso, per aŭto, per boato... Tial mi opiniis, ke mi bonege konas la svisajn kantonojn. Ĉu mi vere konis ilin? Ho, evidentiĝis, ke tute ne... En aprilo 2005 mi esperantistiĝis kaj en oktobro 2005, kiam mi vizitis denove la svisan alpmontaron..., mi ne plu estis simpla turisto, sed „esperantista turisto”. Kiam mi eniris la luitan apartamenton, mi trovis sur la tablo ĉokoladon kaj la bultenon de la Svisa Esperantista Societo, kune kun invitletero en Esperanto... Ekde tiam la telefono ne plu restis muta. La poŝtkesto ne plu restis malplena. La svisaj kantonoj ekmalfermiĝis por mi... La tuta mondo ekmalfermiĝis por mi iomete... Mi komencis kompreni la miraklan fenomenon, kiun ĉiuj esperantistoj spertas pli aŭ malpli frue: la esperantista komunumo, kiu estas nur et-eta procento el la tutmonda loĝantaro, kapablas tamen doni la senton, ke la tuta mondo estas malpli malamikema kaj malpli fremda ol oni supozis...

La ne-esperantistoj ofte demandas min: Ĉu vi ne uzis la francan kaj la anglan dum viaj vojaĝoj tra la svisaj kantonoj antaŭ la jaro 2005? Ĉu vi ne daŭre uzas ilin nun? Mi jesas. Mi ja uzis kaj daŭre uzas tiujn lingvojn por mendi apartamenton, aĉeti manĝaĵon, informiĝi pri la trajnhoraro ktp. Mi neniam sentis min muta en la svisa alpmontaro. Sed geamikojn mi trovis pere de Esperanto. Eĉ miajn nunajn ne-esperantistajn svisajn geamikojn (franc-parolantajn) mi ekkonis danke al komunaj esperantistaj amikoj...

Kara Luiza!

Kiom bele vi priskribas la amikajn rilatojn kaj la fidon, kiuj regas inter esperantistoj. Fakte tio estas kvazaŭ miraklo. Mi komplete samopinias kun viaj diroj. Mi kutimas diri al ĵurnalistoj dum intervjuo: mi uzas la anglan por aĉeti flugbileton; per Esperanto mi havas geamikojn. La „gusto” en la rilato estas tute alia.

Mi dirus eĉ pli: en 1985 mi unuan fojon vojaĝis al Japanio kun mia edzo kaj niaj du filinoj. La komunikado per la angla kun japanoj estis magra, tre magra. Ni estis tre frustritaj, ne ricevante respondojn al niaj demandoj. Post reveno al nia laborloko en Svislando, ni vidis ekspozicion pri E-o kaj lernis la lingvon. Do mi esperantistiĝis pro Japanio, por Japanio, per Japanio kaj tra Japanio. Poste mi reiris al Japanio en 2007, en 2008-2009 dum 6

monatoj kaj en 2012 dum 3 monatoj, kaj spertis tre fruktodonajn kontaktojn per Eo.

Plie okaze de miaj multaj vojaĝoj mi konatiĝis kun homoj, kiuj tre detale kaj adekvate priskribis al mi sian landon, sian kulturon. Tiajn personojn mi nomas PONTOJ. Por esti PONTO iu persono devas unue bone koni sian regionon, sian kulturon. Due li aŭ ŝi devas havi pozitivan rilaton al ĝi, devas fieri pri ĝi. Trie li aŭ ŝi devas havi emon kaj kapablon transdoni siajn konojn pri sia kulturo. Mia unua PONTO estas Majstro Ikeda, kiu instruis al mi ne nur aikidon sed multon pri la japana kulturo. Per benina amiko elstara PONTO mi povas iom post iom kapti faktojn, impresojn kaj sentojn pri Afriko. En Nepalo mi trovis junulon, kiu same ebligas, ke mi komprenu la esencon de lia lando. Ktp. Pri miaj PONTOJ vidu en mia blogo jenon: <https://mirejo3.blogspot.com/2014/11/ponts-pontoj.html>

Luiza: Mi nepre devas rakonti ĉi tie pri unu el la plej nekutimaj spertoj en mia dekjara esperantista vivo. Temas pri la kurseto „Kultura vojaĝo en Vjetnamio”, kiu ekfunkcias ekde decembro 2011 en la paĝaro de *edukado.net*. Ĝi estas „virtuala esperantista turismo”, interaktiva kaj plej moderna el teknika vidpunkto. Akompana diskutejo faciligas la rektan kontakton kun la vjetnamaj ĉiĉeronoj kaj interŝanĝojn de opinioj inter kursanoj. Belegaj bildoj kaj aldonaj filmetoj faciligas konatiĝon kun buntaj vjetnamaj tradicioj. Por mi ĝi estis eksterordinare ĝojiga sperto! Pere de interretaj ligiloj mi spektis koncertojn kaj dancospektaklojn, pupspektaklojn, admiris belegajn pejzaĝojn, lernis pri nekonataj plantoj kaj bestoj, ĝuis emociplenajn popolrakontojn, konatiĝis kun vjetnama pentroarto kaj ceramik-arto, informiĝis pri la vjetnamaj festoj, manĝaĵoj ktp. Sed plej gravas, ke miaj rilatoj kun vjetnamaj geamikoj plifortiĝis dum la ses monatoj de la kurseto. Lando, kiun mi neniam vizitis kaj kiu ŝajnis al mi tute fremda antaŭ tiu kurseto... subite eniris mian koron kaj ekde tiam mi amegas ĝin!

LA EDUKA VALORO DE ESPERANTA KULTURO

Antaŭ 10 jaroj mi opiniis, ke estus tute nerealisme kaj malracie supozi, ke lingvo kapablu plibonigi la mondon. Kaj kion mi pensas nun pri tio? Mi opinias, ke la kontakto kun la Esperante parolanta komunumo plibonigas mian propran vivon. Ĉar lingvo ekzistas pere de komunumo kaj ĝia kulturo, mi ja povus diri, ke sen la lingvo Esperanto mia propra vivo estus malpli ĝoja kaj malpli interesa. Ĉu Esperanto kapablu plibonigi la vivon de la tuta homaro? Al tiu ĉi demando respondos la homaro mem, dum la ontaj jarcentoj. Niatempe la esperantistoj kutime opinias, ke ĝi ja estas

pliboniganta iliajn proprajn vivojn. Do, ĝi ja kapablas plibonigi la vivon de tiuj, kiuj libervole elektas eklerni ĝin. Oni povus aserti la samon pri muziko, pri sporto, pri saniga kaj bongusta kuirado ktp.

Ĉu la Esperanta kulturo havas edukan valoron?

Por mi mem ĝi ja pruviĝis edukvalora. Miaj propraj esperantistaj spertoj igis min pli optimisma kaj pli amikema, larĝigis mian mensan horizonton, kreskigis mian vivoĝojon, igis min pli kreema, pli kuraĝa... Pro tiuj ŝanĝoj en mia vivo, mi ja fidas je ĝia eduka valoro.

Kara Luiza! Jes, uzante nian lingvon ni ekkonas aliajn kulturojn kaj akiras pli da toleremo kaj solidareco. Mi devas konstati, ke ne ĉiuj esperantistoj estas anĝeloj honestaj, ĉar ni ĉiuj estas homoj. Tamen la plimulto de ili estas gastigemaj kaj malfermitaj. Gastante ĉe multaj esperantistoj mi ĉiam sekvis iliajn sugestojn kaj konsilojn por organizi miajn vizitojn kaj ekskursojn, kaj ĉiam mi estis kontenta pri tio. Iliaj klarigoj pri sia kulturo enorme riĉigis min kaj edukis min al pli da toleremo kaj malfermiteco.

(somero 2015 por la origina teksto de Luiza)



Duncan Charters parolas en la 52-a Kongreso de ILEI

Kelkaj notoj pri instruado de lingvoj, precipe de Esperanto, en bazlernejoj en Ĉeĥio

de Josef VOJÁČEK (Ĉeĥio) (teksto el 2015)

Ekde la lernojaro 2013/2014 estas en bazlernejoj kaj mezlernejoj instruataj du fremdaj lingvoj. Preferata kiel la unua lingvo estas la angla de la tria klaso. La plua fremda lingvo estas instruata en la 7-a, 8-a kaj 9-a klasoj. S-ano Viktor DVORÁK iniciatis laborgrupeton por ebligi envicigon de Esperanto en la grupon „plua fremda lingvo”.

Por Esperanto estis ellaborita „Normo” (kia ekzistas por ĉiu instruata lingvo), kiu difinas sciojn de lernantoj fine de ĉiu lernojaro. Por ĝi estis uzita la lernolibro de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo*. Laŭ ĝi estis ellaborita ankaŭ instruprogramo por la lastaj tri klasoj de la deviga instruado.

Do, la materialoj estas preparitaj. Pri tio, kiu lingvo estos instruata kiel plua (la dua) fremda lingvo, ne decidus la ministerio, sed la direktoro de lernejo. Kaj lia decido estas influata de la intereso de la lernantoj, aŭ pli precize, de iliaj gepatroj kaj de tio, ĉu por la lingvo estas instruisto. Tiu estas la ĉefaj problemoj. Instruistoj aŭ instruantoj de Esperanto en Ĉeĥio estas fakte amatoraj, ĉar ne estas ĉe ni eblo akiri akreditecon por instruado de Esperanto. Kompreneble, estas kursoj en AMU en Poznań, sed mi konas nenium en Ĉeĥio, kiu povus aliĝi al tiu studado. Eĉ se estos instruisto (nun ne estas tiom strikte postulata la akrediteco), estus preskaŭ miraklo, kiam inter gepatroj estus tia intereso pri instruado de E-o, ke la direktoro decidu instrui ĝin kiel duan lingvon.

Tamen estas grave havi preparitajn materialojn por la instruado de E-o. Verŝajne en ĉiuj landoj de EU estos similaj postuloj, do necesos havi ian normigitan programon kaj lernolibron, ankaŭ elektitan instrumentodon. Tiam estus bone pritrakti, kiun libron rekomendi. Tiu de Stano Marček, kiu ekzistas en multaj lingvaj variantoj, kaj ĝuste la uzita rekta metodo estas rekomendindaj. Tion devus pripensi kaj landaj sekcioj de ILEI kaj landaj asocioj por unueca preparo de instruado de Esperanto. Tial mi sendas ĉi tiujn notojn por diskuto en la UK en la programo TAGO DE LERNADO kaj plua komuna traktado dum la venontjara ILEI-konferenco kaj UK en Nitra en Slovakio.

En la UK de Lille partoprenas grupo de ĉeĥoj, do certe estos trovebla iu, kiu povos ion kompletigi aŭ klarigi, se estos necese.

Noto de Mireille GROSJEAN: Ekde aprilo 2016 kuŝas tiu teksto en mia komputilo. Hodiaŭ (2019-07-29) mi volas reagi:

Instruado de Esperanto okazas en ĉiuj anguloj de la mondo, en plej diversaj klasoj kaj regionoj, en plej diversaj instrusistemoj. La postuloj de la ministerioj pri edukado varias. La elekto de iu „norma” lernolibro varias. Pri tio mi povas doni ekzemplon: mi miris, kiam mi instruis Esperanton en Benino al centoj de personoj, kiuj povis dum horo mem studi elektante lernolibron same kiel oni elektas libron en biblioteko. Neniu elektis la libron de Stano Marček... Mi ne scias kial, sed estis fakto: ili elektis lernolibron de SAT-amikaro, kiun mi taksus malnovstila... Jen surprizo por mi. Do aserti, pro la fakto, ke tiu libro estas tradukita al proksimume 40 lingvoj, ke tiu libro konvenas al la tuta mondo, estas troigo.

En via teksto vi mencias instruprogramon ekzistantan surbaze de tiu lernolibro. Mi tre ŝatus ricevi ĝin. Povus esti, ke kaj la libron kaj la instruprogramon ni povus rekomendi en Eŭropo ekzemple.

Vi mencias, ke iu lernejestro rajtas decidi pri la dua lernota fremda lingvo. Tio koncernas nur vian landon Ĉeĥio. En aliaj landoj la decido ne estas tie, sed ĉe la tutlanda ministro aŭ kantona estro en Svislando ekzemple, do je provinca nivelo. Do la instruautoritatoj malsimilas de lando al lando kaj ni devas scii kaj konsideri tion.

Ni ĉiuj sekvas la evoluon de la projekto „Multlingva Akcelilo”, kiu evoluas en grupo de landoj ĉirkaŭ Slovenio. Laŭ tiu programo instruistoj de aliaj lingvoj povos instrui Esperanton. Kadre de tiu programo la gvidantoj ankaŭ preparas instruplanon, metodikon kaj instrumaterialon. Do ni ĉiuj senpacience atendas la finon de tiu projekto kaj la prezenton de ĝiaj rezultoj.

Resume mi substrekas, ke la apero de instruprogramo detale prilaborita estas deziro de multaj instruantoj kaj instruistoj de Esperanto, kaj ILEI scias tion. Mi dankas vin, ke vi puŝas la Ligon al ekago. Ĉu la afrikaj kandidatoj al „Esperanto-Instruista Trejnado” (EIT) produktos ion tian kaj kontribuos al tio? Estus bona paŝo, tamen tia laborgrupo devus enteni pedagogojn el diversaj landoj kaj kontinentoj pro la fakto, ke ILEI laboras mondscale. Jen pripensinda afero. Tio ne malebligas, ke vi paŝu antaŭen en via lando!

Mireille GROSJEAN, prezidanto de ILEI

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire, Marie-Sylvie Julian, Emmanuel Desbrières**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj 32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna Amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Nova peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) kiu zorgos pri vidhandikapitaj membroj de ILEI kaj abonantoj de la tekstaj versioj *IPR* kaj *JA*, estas Vjaĉeslav Suslov, rete: gloro59@yandex.ru. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2019,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de oktobro 2019.**



Grupoj de partoprenantoj de la 52-a ILEI-Kongreso



